

gia konvertiĝo kaj tiu disŝiranta anima krizo, kiun li malkaŝe priskribis en la libro „Infero” k.t.p. Sed la tempo ne permesas tion.

Jam longe antaŭ sia morto en la jaro 1912 August Strindberg akiris unikan pozicion en la sveda literaturo kaj eĉ atingis internacian famon. Sed kompreneble la prijuĝoj pri tiel komplikita kaj kontrastoplena homo estis tre variaj. Neniu ja povis serioze nei tiajn kvalitojn kiel lia neelĉerpebla kreipovo kaj lia senlaca batalemo, lia falkokula observokapablo, lia marfreŝa natursento kaj lia lingva novkreado. Kontraŭ ĉio tio kontrastas ĉefe lia sendisciplina sentopencado, kiu ĉiam logas lin en la densaĵojn de paradoksoj, malkonsekvencoj kaj fine ankaŭ superstiĉo. Tio evidente interdependas kun lia psika malharmonio. Karakteriza estis lia forta malamo, kiu esencaparte konsistigas la eksplodemon de lia verkado. Tiu grava loko, kiun la malamo okupas en lia mondkoncepto, ne plu ŝajnas tiom troigita kaj absurda. Tiuj barbaraj pasioj, kiuj malplaĉis al liaj samtempuloj, pli malfrue en nia tempo libere batalis sur la granda mondareno; lian malegalan batalon kontraŭ ili nun transprenis la tuta homaro. Ni eĉ povas diri, ke tiu enrigardo en la psikologian meĥanisman de timo, malamo, ĉiama pravemo kaj venĝo, kiun Strindberg prezentas en siaj verkoj kun senkompara malkaŝemo, donis al lia verkaro novan aktualacon. Sed ĝi ankaŭ malkovras la profundan suferadon, al kiu kondukas tia monomanio. Kaj el la suferado nevenkeble leviĝas tiu sopiro al repaciĝo kaj homa konkordo, kiun ni malgraŭ ĉio perceptas kiel la plej interne vibrantan tonon en la verkaro de August Strindberg.

## KELKAJ TEZOJ DE LA AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

4089.2

2) Esperanto devas resti simpla helplingvo, precipe por nestudintaj personoj kaj por la orientaj popoloj. Alie ĝi ne havus sencon kaj povus cedi al unu el la grandaj naciaj lingvoj. — La Zamenhofa Esperanto estas genia kreaĵo kun propra strukturo kiu kombinas la preferojn de la fleksiaj lingvoj kaj de la kunmetaj lingvoj. Ĝia karaktero kiel helplingvo estas esence ligita kun la principo de la element-kunmetado. Bedaŭrinde, pro la nuntempa interrompo de nia movado malantaŭ la Fera Kurteno, la influo de la slavaj kaj aziaj esperantistoj mankas, kaj tial superiĝas la koncepto de la okcidentanoj, kiuj influite de la pli potenciĝinta angla lingvo, tro emas apliki al Esperanto ties memstarajn kontraŭprincipajn vortemblemojn.

Kelkdekoj da novaj vortoj en Esperanto, kiujn cetere novuloj ne devus lerni, kompreneble ne endanĝerigas la sistemon. Sed ekkoninte la principon, ni rajtas kaj devas averti, ke oni ne malĝusttendence kaj facilanime enkonduku novajn vortojn superfluajn, por ke la vortaro de Esperanto ne fariĝu pli granda kaj pli neregula ol tiu de iu nacia lingvo.

3) Laŭ nia opinio Esperanto ja estas vivanta lingvo, sed ne libere vivanta kiel sovaĝa kreskaĵo en arbaro, sed ame plantita kaj flegenda kiel fruktarbeto en ĝardeno. La esperantistoj devas per taŭgaj organoj gardi, kontroli kaj reguli la evoluon de la lingvo, por ke ĝi ne miskresku preter sia celo, facile servi al ĉiuj. Esperanto-instruistoj kaj vizitantoj de Esp.-kongresoj nedubeble povas konstati, ke Esperanto jam en sia nuna formo prezentas certajn lingvajn malfacilaĵojn al la plimulto de la esperantistoj. Kial plimalfaciligi ĝin per ignoro de la kunmetebleco kaj enkonduko de superfluaj radikoj?

4) La esperantistaj vortaristoj devas laŭ nia opinio ne nur registri neologismojn, ofte nur efemere aperintajn, sed kritiki, prijuĝi kaj bone marki ilin. Precipe ni opinias, ke la Plena Vortaro devus pli kritiki rilate al novaj vortoj, uzante la atributon „evitinde” antaŭ ĉio en kazoj, kiam du aŭ pluraj novvortoj aperas por unu sama ideo. En Esperanto ne devus ekzisti sinonimoj. La jam ekzistantajn ni ne volas „kondamni”, sed ni deziras pliajn eviti (ekz. strando aŭ plaĝo, grapolo aŭ traŭbo).

(La AEI krome donis kelkajn tezojn kun polemika enhavo. Red.)

413.164 : 389.6(100)

## LA INTER-SIMILIGO DE NACIAJ FAKTERMINOJ EN LA TEKNIKA KOMITATO ISO/TC 37 „TERMINOLOGIO”<sup>1)</sup>

Raporto de R. HAFERKORN

kun traduko de la plej grava ĉapitro el la lasta publikigaĵo de d-ro inĝ. Eugen Wüster pri la *internacia lingvonormigo en la tekniko*.

*Enkonduko.* - La ĉisubaj linioj celas atentigi la lingvistojn inter la Esperantistoj pri la rolo, kiun „*Interlingua/Occidental*” ludas en la laboro de la normigaj fakuloj: En la normigaj komisionoj oni unue celas adapti la eksteran formon de nacilingvaj noci-nomoj. Farante tion, la deveno - plej ofte latina aŭ greka - devas esti atentata; ĉi tiu plej ofte estas komuna al la apartaj lingvoj. Estas necese formi la lingvohistorie ĝustan *normformon* de ĉiu termino, kiu laŭeble estas liberigata el nacia idiotismo (ekz. anglicismo, germanismo). Kio validas por ĉiu nacilingva fremdvorto, ankaŭ validas por la Esperantotermينو. Sur tiu ĉi metodo baziĝas la „*Interlingua*”-sistemo kaj la *IALA-Vortaro*.

La ĉisube citota artikolo de Wüster kaŭzis multe da miskompreno; leginte ĝin la esperantistoj unue miregis pri la stranga konduto de Wüster, kiu unuflanke estas famkonata kiel aŭtoro de la bonega „*Enciklopedia Vortaro de Esperanto*” kaj eminenta spertulo pri nia lingvo, aliflanke ŝajne pledas por „*Interlingua*” en la rondo de la normigaj fakuloj. Sed la sekvantaj linioj forigos tiun ŝajnan kontraŭecon; ili montros ke malgraŭ ke la normigaj fakuloj uzas „*Interlingua*”-terminojn kiel unuan ŝtupon de la adaptado, Wüster nun same kiel antaŭe opinias ke Esperanto estas la plej taŭga interkomprenilo koncerne la *komunan* lingvon inter homo kaj homo.

<sup>1)</sup> Vidu ankaŭ p. 34.

Traduko de la plej grava ĉapitro de artikolo de Eugen Wüster.

„*Technische Sprachnormung - Aufgaben und Stand*”, publikigita en la nova revuo „*Sprachforum*” - Zeitschrift für angewandte Sprachwissenschaft zur überfachlichen Erörterung gemeinwichtiger Sprachfragen aller Lebensgebiete. Unua jarkolekto (1955), Böhlau-Verlag Köln, Germanujo.

En la unua numero de la menciita revuo, pĝ. 56-57, troviĝas jena ĉapitro:

Paragr. 3.2 *Internacia Inter-Similigo de la Noci-Nomoj.*

3.21 *Inter-Similigo de la Nocioj.* - Kiu aŭdas pri *internacia normigo terminologia*, plej ofte opinias ke tio estas nur nomo por la enkonduko de fremdvortoj aŭ artefaritaj vortoj. Vere kontraŭe la plej urĝa tasko de la internacia normigo faklingva konsistas el la inter-similigo de la *nocioj* kaj *nocisistemoj*. La pli frue menciita IEC-Vortaro ekz. prezentas multajn ekzemplojn de tia inter-similigo de nocioj.

3.22 *Inter-Similigo de la Interna (= Semanta) Formo.* - Ĉe dua loko la internacia lingvonormigo estas inter-similigo de la „interna formo” de la noci-nomoj. La plej multaj noci-nomoj estas ne vort-elementoj en ilia fundamenta signifo, sed vortkunigaĵoj kaj noci-metaforoj. La laŭvorta signifo fundamenta de tiaj esprimoj estas tio, kion oni nomas laŭ *Marty* la „internan” (aŭ ankaŭ „semantan”) formon de noci-nomo. La inter-similigo de ĉi tiu interna formo do fakte estas „prunt-metaforoj” (aŭ „pruntaj tradukoj”) (*Mauthner*).

3.23 *Inter-Similigo de la Ekstera Formo.* - Ekstreme je lasta loko - kaj laŭ amplekso, kaj laŭ la graveco - staras la inter-similigo de la ekstera formo de la noci-nomoj, t.e. de ilia sonformo aŭ ilia skribformo.

Gravan kontribuon al ĉi tiu parta tasko reprezentas la *Interlingua Vortaro*, kiu en 1951 aperis kiel rezultajo de la jardecaj laboroj esploraj de la *International Auxiliary Language Association (IALA)* en New York. Gvidantoj de ĉi tiuj laboroj estis, unu post la alia, la lingvistoj *Collinson, Stillmann, Gode, Martinet* kaj denove *Gode*.

Kiam en 1936 la *Teknika Komitato ISA 37 „Terminologio”* komencis okupiĝi pri la demando de la internaciaj fak-esprimoj, la reprezentantoj de pluraj landoj opiniis ke la solvo konsistos en *kodaj vortoj* kiuj estas formataj laŭ simila maniero kiel Esperanto-vortoj. Jam baldaŭ kontraŭe montriĝis ke tia solvo trafas sur apenaŭ unuvoĉan reziston de la normigaj fakuloj; nome pro tio, ke Esperanto-vortoj kiel *konus/o* (= *Konus, Kegel*), *konus/a* (= *konisch, kegelförmig*), *konus/eco* (= *Konizität*) foriĝas nenecese multe el la jam internaciaj formoj („*Konus*”, „*konisch*”, „*Konizität*”).

La diskutoj de la lastaj jaroj antaŭmilitaj montris ĉiam pli klare ke por la celoj de la terminologia normigo internacia io alia estas necesa. Do speco de *terminologia* ŝlosilo, kiu elĉerpas el la ekzistantaj terminoj internaciaj la esencajn erojn tiamaniere ke laŭvole multaj stilpuraj novoformaĵoj povas esti gajnataj per interpolado kaj eksterpolado. La sistemo de la IALA tre alproksimiĝas al tiu celo. La vortojn *cono, con/ic, con/ic/itate* ekz. ĉiu ajn komprenas; ili estas formitaj laŭ simplaj, antaŭkonataj reguloj el antaŭkonataj elementoj. Formoj de ĉi tiu farado facile povas esti transigataj en la naciajn lingvojn laŭ ĉie konataj reguloj, kaj inverse.

Estas precipe akcentende ke la esploraj rezultoj fiksitaj en la vortaro de la IALA, nepre ne limiĝas je la ekstera formo de la noci-nomoj, sed ke ankaŭ la semanta flanko zorge estas pritraktita. Ekz. ĉe la „*ŝajn-internaciaj*” vortoj kiel *actual, fraction, parterre* estas ekzamenita, kiuj el la ekzistantaj signifoj povas esti rigardataj kiel internaciaj.

En la postmilita komitato ISO/TC 37 la internaciigo de la ekstera formo ankoraŭ ne estas preparolita.

La ĉisupra artikolo de Wüster kaŭzis multe da maltrankvilo inter la esperantistoj pro la ŝajna kontraŭula konduto de W. koncerne Esperanton. Pro tio la verkinto de ĉi tiuj linioj petis d-ron W. klarigi la aferon.

Jen traduko de la *respondletero de Wüster*:

„*Koncerne mian artikolon en „Sprachforum”.* - Mi bedaŭras ke vi kaj aliaj esperantistoj indignas pri la loko 3.23 „*Inter-Similigo de la Ekstera Formo*” (pĝ. 57) de mia artikolo en „*Sprachforum*”.

Eble mi esprimis min ne sufiĉe klare.

*Inter-similigo de la fak-esprimoj.* - Ĉe la inter-similigo de la ekstera formo de la naciaj fakesprimoj (precipe de latina aŭ greka deveno) la komuna etimologio estas fundamente grava. Ĝi povas esti evidente prezentata per „normformoj” lingvohistorie ĝuste faritaj kaj laŭeble senvestigataj de naciaj proprecoj. La esprimon „normformo” (G: *Normalform*) ĉi tie estu komprenata analoge al la esprimo „normformo de ekvacio” (en matematiko).

Simile okazas jam delonge en lingvohistoriaj verkaĵoj, ekz. pere de la rekonstruado de popollatinaj aŭ mezolatinaj formoj.

Terminaroj de ĉi tiu speco estas destinitaj, formi la bazon por la nacilingvaj formoj de internaciaj fak-esprimoj. Modeloj por ĉi tiu procedo estas amasaj. Ankaŭ por la fakterminoj de Esperanto tiaj terminaroj devas servi kiel etimologia bazo („*du-ŝtupa-metodo*”). Tiamaniere oni jam ĝis nun nepre agis 1).

Inversigo de ĉi tiu procedo kontraŭe, t.e. la derivado de la naciaj formoj (de la ekstera formo) el la Esperanto-vortoj principe estas neebla. Nome pro la tro eta etimologia parenceco de la derivsistemo de Esperanto kaj pro la ofte arbitra aliigo de la vortradikoj en Esperanto.

*Avantaĝo de Esperanto.* - De mia infan-epoko mi daŭre spertis, ke Esperanto en interrilato de homo al homo povas atingi multe pli ol ĉiu alia fremdlingvo. Ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ, je miaj nombregaj vojaĝoj eksterlanden, mi tion trovas konfirmata ĉiam denove. Mi ankaŭ ne lacas rakonti tion al aliaj homoj.

*Dividado de la problemo.* - Tio tamen estas tute alia demando ol la inter-similigo de la ekstera formo de la naciaj fakterminoj. Se oni konfuzas la du problemojn, tiam tio malhelpas la solvon de ambaŭ problemoj. Mi mem ne tute povas senkulpiĝi min pri tio ke mi malklarigis ĉi tiun distingon en miaj publikigaĵoj antaŭ kelkaj jardekoj. Sed post tio mi fariĝis pli riĉa je 25 jaroj da sperto pri inter-similigo kaj normigo de lingvo.

1) Laŭsistemaj verkaĵoj tiurilate troviĝas en la Esperanto-lingvistika revuo „*Esperantologio*”:

F. I. Wiener, *Ŝajnprefiksoj*. Vol. 1-a, n-ro 3 (1951), pĝ. 145-151.

C. A. Ten Seldam, ..... kvazaŭ-afiksoj en Esperanto, n-ro 4 (1955), pĝ. 215-227.

*Pledado por la pura Esperanto-starpunkto.* - Estas konate al mi ke la plimulto el la esperantistoj (ĝenerale: mondlingvistoj) ne multe pripensis la limigon de ambaŭ problemoj. Iuj esperantistoj eble ankaŭ rifuzas la *du-dividon* de la problemo, plej ofte pro certa malpacienca instinkta.

Pro tio kelkajn jarojn antaŭ la milito mi jam petis taŭgegajn reprezentantojn de esperantistaj inĝenieroj, rigardi ne ĉiam min kiel reprezentanton de Esperanto en la IEC kaj en la ISA, sed anstataŭe komisii personojn de sia elekto. Tiom tiam ankaŭ okazis en la IEC kaj poste en la ISA.

En la ISO laŭprincipe estas du ebloj por persona reprezentado de iuj starpunktoj: per nacia normiga komisiono (kun voĉdonrajto) aŭ per internacia organizaĵo (kiel observanto, t.e. sen voĉdonrajto). Se la esperantistoj volas iri la unuan vojon, ili devas provi, gajni nacian normigan komisionon por sia starpunkto. En la dua kazo, internacia organizaĵo devas direkti peton por allaso ĉe la ĝenerala sekretario de la ISO."

La verkinto de la ĉi-supra raporto rekomendas diskuti la problemojn, pri kiuj Wüster informis nin, en la ISAE-estraro kaj en Scienca Revuo. Estas dezirinde plua artikolo en nia revuo pritraktu la esencon de la „Interlingua“-vortoj kaj de la IALA-Vortaro, kaj se eble ankaŭ publikigu specimenan paĝon de tiu vortaro.

## RECENZOJ

019.941  
(048.1)

413.164 : 389.6(100)

**Technische Sprachnormung** (Normigo de la teknika lingvaĵo) artikolo de Eugen Wüster en „Sprachforum, Zeitschrift für angewandte Sprachwissenschaft zur überfachlichen Erörterung gemeinwichtiger Sprachfragen aller Lebensgebiete“ 1 (1955) 51-61 (Böhlau-Verlag, Münster/Köln).

D-ro Wüster konstatas ke pro homa inerteco ne eblas plibonigi, laŭnormigi la tradiciajn lingvojn, ĉar eventualaj decidoj tiudirektaj simple restus senefikaj frazoj. Tia normigo eblas tamen rilate al fakaj terminaroj pro tio ke ĉi-rilate logika pensado okupas multe pli fortan pozicion, kaj ĉar la uzantoj de tiuj fakaj lingvaĵoj ĉiam estas nur malgranda parto el samlingvanaro. Aliparte ĝuste la faka lingvaĵo postulas normigon, bezonas gvidon, ĉar ĝi devas kontentigi postulojn pri ekzaktec kaj precizeco de esprimo multe pli severajn ol la komuna lingvaĵo, sed precipe ankaŭ ĉar la fakaj terminaroj ĉiujare kreskas pli kaj pli rapide pro la rapida kresko de la nociaro.

Ĉi tiu normigo havas du aspektojn. Temas pri normigo de apartaj terminaroj unuparte, kaj pri normigo de terminologiaj principoj kaj reguloj aliparte. Ĉi tiun kaj ceterajn normigajn laborojn organizas kaj entreprenas la diversaj naciaj normigaj organizaĵoj. En bibliografio kompilita sub gvido de d-ro E. Wüster kaj publikigita de Unesko (*Bibliography of Monolingual Scientific and Technical Dictionaries, Vol. I, - National Standards*. Paris, 1955) estas registritaj ĉirkaŭ 1500 nacilingvaj terminaraj normoj el 36 landoj, nome 1376 normoj pure terminaraj, 182 parte terminaraj, krome 23 publikigaĵoj pri terminara normigo.

Pri internacia terminara normigo okupiĝas ISO (*International Or-*

*ganization for Standardization*), nome ĝia Teknika Komitato ISO/TC 37 „Terminologio (Principoj kaj Kunordigo)“ kies motoro estas d-ro Wüster, kaj IEC (Internacia Elektroteknika Komisiono, nun sekcio de ISO). La ĉefa verko en la kampo de internacia terminara normigo estas la internacia elektroteknika vortaro, publikigita unuafoje en 1938 post pli-ol-30-jara prepara laboro.

Ankaŭ Unesko klopodas helpi la internacian terminaran normigon, nome la publikigon de fakaj terminaroj.

Pli grava ol la normigo de apartaj terminoj kaj terminaroj estas la starigo de devigaj principoj kaj reguloj por la kreo de terminoj. Ĉe tio oni konsideru ke la nocioj antaŭas la respondajn terminojn. Antaŭe oni komencis per la terminoj, prokrastante la pritrakton de la nocioj mem. Sed oni ekkonsciis ke pli grava ol la ekstera formo de la terminoj estas la baza sistemo de nocioj.

Ekzemplo de terminologia principo estas jena: Se en kreota termino ni devas, por distingi, indiki iun karakterizaĵon, validas jena rangordo de prefero:

a) neforigeblaj, prefere percepteblaj karakterizaĵoj (ekz. formo, materialo, koloro, temperaturo, ktp.); b) uzo, utiligo; c) deveno (procedo de fabrikado; inventinto; lando de deveno).

En la internacia faklingva normigo ĉefa afero estas la interadaptado kaj laŭebla similigo de la nocioj kaj nociaroj. Post tio sekvas la intersimiligo de la „interna“ aŭ „semantika“ formo de la terminoj. Ja la pli multaj fakaj terminoj ne konsistas el nur unu vortelemento uzata en sia fundamenta senco, sed el pluraj tiaj elementoj ofte kun sencoj metaforaj. La „laŭvorta“ (ne-metafora) signifo de tiaj esprimoj nomiĝas „interna“ aŭ „semantika“ formo de termino. Ilia intersimiligo kondukas al „pruntotradukoj“, t.e. el unu lingvo aliaj lingvoj transprenas la semantikan formon tradukante laŭvorte la diversajn elementojn kiuj konsistigas la modelan terminon alilingvan.

Kaj laŭ amplekso kaj laŭ graveco lastaloke staras la intersimiligo de la ekstera formo, t.e. ĝia sono- kaj/aŭ ĝia skriboformo. Ĉi tie la aŭtoro atentigas pri la laboro de IALA kaj pri la antaŭmilitaj proponoj de Wüster, Drezen, kaj aliaj uzi fakkodajn esprimojn kreitajn kiel la vortoj esperantaj. Ĉi tiuj proponoj renkontis la rifuzon de la ne-esperantistaj normigantoj, kiuj trovis ke tiaj (esperantaj) kodovortoj laŭ sia ekstera formo tro devias de la greko-latina formoj uzataj en multaj lingvoj. Por tiu celo kaj kiel modelo por nacilingvaj esprimoj do eble pli taŭgas la vortmaterialo kolektita de IALA, ĉar ĝi estas prenita el tiuj naciaj lingvoj kun minimuma (?) ŝanĝo. Neforgesenda ĉe tio estas la semantika flanko de la afero. Similaspektaj vortoj ja ofte ne havas (plu) la samajn signifojn en diversaj lingvoj.

Post la milito en ISO/TC 37 la internaciigo de la ekstera formo de terminoj ankoraŭ ne diskutiĝis. Ni, esperantistoj, konsciu ke ĉi tie troviĝas por ni kaj nia lingvo la punkto kie akcepto de „internacie normigitaj (eksteraj) formoj“ signifus amasigon en Esperanto de sennombraj superfluaĵoj kiuj prenas la lokon de la aŭtonomaj derivaĵoj esperantaj. Per tia adapto de la internacia lingvo al la internacia (fak-) lingva normigo ni nepre ne farus servon al la aktivaj uzantoj kaj uzantoj de la internacia lingvo.

Fine d-ro Wüster diskutas la normigon de la fakaj vortaroj (unu-